



THE ESPERANTO MONTHLY

A
MAGAZINE
FOR
TEACHERS
AND
STUDENTS
OF THE
INTERNATIONAL
LANGUAGE



*All the world
at your elbow*

LIVERPOOL NUMBER

The Congress will not be
complete without

YOU

NOTE THE DATE

JUNE 6-10

Published by
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC)
17, HART STREET, LONDON, W.C.1.

ESPERANTO AT A GLANCE

ESPERANTO IS PHONETIC.

All letters sounded :
one letter one sound.

ACCENT or STRESS falls on the second last syllable.

NO IRREGULARITIES.
NO EXCEPTIONS.

THE ALPHABET OF ESPERANTO

A a	B b	C c	Ĉ ĉ	D d	E e	F f	G g
<i>ah</i>	<i>bo</i>	<i>tso</i>	<i>cho do</i>	<i>eh</i>	<i>fo</i>	<i>go</i>	
Ĝ ĝ	H h	Ĥ ĥ	I i	J j	Ĵ ĵ		
<i>Joe</i>	<i>ho</i>	<i>hho</i>	<i>ee</i>	<i>yo</i>	<i>zho</i>		
K k	L l	M m	N n	O o	P p	R r	S s
<i>ko</i>	<i>lo</i>	<i>mo</i>	<i>no</i>	<i>oh</i>	<i>po</i>	<i>ro</i>	<i>so</i>
Ŝ ŝ	T t	U u	Ŭ ŭ	V v	Z z		
<i>sho</i>	<i>toe</i>	<i>oo</i>	<i>woe</i>	<i>vo</i>	<i>zo</i>		

No Q, W, X, or Y.

A, E, I, O, U have approximately the sounds as in *bar, bear, bier, bore, boor.*

C is not sounded like S or K, but like *ts* in *Tsar*.

J has the sound of *y* in *yes*.

The sounds of ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, and ŭ are heard in *leech, liege, loch, leisure, leash, and leeway.*

THE GRAMMAR is based upon SIXTEEN FUNDAMENTAL RULES.

THE PARTS OF SPEECH are formed from Root-Words by the addition of appropriate Letters.

O is the ending of the NOUN: fakto, telefono, piano, gluo, fajro, tasko, evidenta, longa, granda, freŝa, furioza, simpla **A**

NOUNS and ADJECTIVES form the PLURAL by adding evidentaj faktoj, longaj telefonoj, grandaj pianoj **J** *aj, oj* sound as in *my boy*

THE SIMPLE VERB HAS ONLY SIX INFLECTIONS.

INFINITIVE.	PRESENT.	PAST.	FUTURE.	CONDITIONAL.	IMPERATIVE.
I	AS	IS	OS	US	U
ESTI	estas	estis	estos	estus	estu
LERNI	lernas	lernis	lernos	lernus	lernu
INSTRUI	instruas	instruis	instruos	instruus	instruu

N marks the ACCUSATIVE (*direct object*)
Mi (*I*) instruas lin (*him*)
Li (*he*) instruas min (*me*)
Ŝi lernas Esperanton

ADVERBS end in **E**
rapide
entuziasme
diligente

ESTU PRETA: LERNU ESPERANTON

PARTICIPLES used as ADJECTIVES, NOUNS, and ADVERBS:

ACTIVE—Present -ANT'	Past -INT'	Future -ONT'
PASSIVE—Present -AT'	Past -IT'	Future -OT'
Mi estas instruanta.	Mi estas la instruanto.	Instruante, mi lernas.
Vi estas instruata.	Vi estas la instruato.	Instruate, vi lernas.

ĈU pr. <i>chew</i> . ASKS QUESTIONS.	piano	} estas	rozo	} estas	banano	} estas	elefanto	} estas
	harpo		tulipo		tomato		gorilo	
	fluto	INSTRU- MENTO	lilio	FLORO	melono	FRUKTO	ĝirafo	BESTO
	violono		geranio		olivo		kato	
	orgeno		violo		orango		hundo	
	trumpeto		narciso		figo		kamelo	

Let your *YES* be **JES** and your *NAY* be **NE**

LA	tasko	} estas	simpla	THE PREFIX	malsimpla	KOLOROJ.
	piano		(<i>is</i>)		granda	
(<i>The</i>)	fiŝo	} estis	freŝa	MAL	malfreŝa	blanka papero
	anekdoto		(<i>was</i>)		longa	mallonga
	progreso	} estos	rapida	DENOTES	malrapida	blua kraĵono
	raporto		(<i>will be</i>)	favora	OPPOSITES.	malfavora
						rozaj lipoj

NUMERALS—UNU, 1; du, 2; tri, 3; kvar, 4; kvin, 5; ses, sep, ok, naŭ, dek; cent, 100; mil, 1000; miliono. ORDINALS: unua klaso, dua klaso, tria klaso.

PROFESSIONS shown by suffix	IST	dentisto	ĵurnalisto	FEMININES shown by suffix	IN	patro	patrino
		farmaciisto	botisto			reĝo	reĝino
						leono	leonino

An ESPERANTO KEY, containing Grammar, Vocabulary, and Exercises, will be sent on receipt of a penny stamp by THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorp.), 17 Hart Street, London, W.C.1

Why go to the Congress?

The return of peace conditions has made our Esperanto Congresses again possible, and with longing eyes *samideanoj* are looking forward to meeting one another again at Liverpool during the Whit week-end. No more appropriate time for a meeting of Esperantists can be imagined than the Christian festival of the Day of Pentecost, with its reminder of "the gift of tongues." The Liverpool Congress is a national one, but there is a likelihood that it will have a somewhat international character, as a number of continental Esperantists have announced their intention of being present. Much interest has been aroused in other countries by the practical progress of Esperanto in Britain, and leaders of the movement on the Continent desire to meet and confer with those here who have been directing the attention of educationists and business men to the advantages which Esperanto affords. These visitors will be heartily welcomed.

The student of Esperanto who has recently come into the movement may be inclined to ask why he should be expected to go to the Congress. The fact that there are many Esperantists who go to these congresses year after year, often at considerable sacrifice of time and money, speaks for itself. The congresses have a charm which is irresistible. One seems for the time to be plunged into another and a better world. One hears our beautiful language spoken by those who are masters of it; one receives stimulus from the experiences of those who have been carrying on Esperantist activities in various districts; one is warmed by the enthusiasm of others, keen for spreading the knowledge of the international tongue throughout the world. Even the silent member

of the Congress, who supports the speakers with sympathetic interest, helps to create the atmosphere which spells success for these gatherings.

We would advise anyone who has never been at an Esperanto Congress and wishes to derive the greatest amount of benefit from it, to determine before going "nepre paroli Esperante." Do not imagine that those who are supposed to be experts will grow impatient with the stammerer. It will usually be found that those who are the true masters of the language are the most sympathetic and helpful and considerate to the beginner who is trying to find his "Esperanto legs." Anyone who has had the privilege of conversation with the late Dr Zamenhof, will remember how patiently he would listen to a tyro, almost with the pleasure, one would think, which a parent feels when he hears the lisping of his infant child.

Whoever goes to the Liverpool Congress will find it yield many other valuable experiences. The attractions of the city, which are set forth in another column, will appeal to many. Liverpool is one of the world's greatest commercial and shipping centres. If Esperanto could catch the imagination of the Liverpool commercial and shipping magnates, and be translated by them into daily use, it would spread through the world with irresistible force, and its general adoption would be within sight. The local organisers are not without hope that the Congress will have a powerful influence in the City, and if we all go there with a firm determination not to waste the opportunity, the Liverpool Congress may form one of the epoch-making events in the Esperanto movement.

W. M. PAGE.

Liverpool.



Oni diras, ke Liverpolo estas urbo de granda antikveco. Efektive la antikvistoj identigas ĝin kun la brita havenurbo nomita *Portus Segantorium*, priskribita de

Ptolemy, la geografiisto de Aleksandrio. Ĝia historio, do, datiĝas almenaŭ de la roma epoko en Britujo.

Ekzistas konfliktaĵoj opinioj pri la deveno de la nomo, kaj oni ne povas miri pri tio, ĉar, interalie, oni ĝin silabas *Liverpool*, *Leverpool*, *Litherpoole*, *Lyverpoole*, *Lyrpole*, *Lerpool*, *Livrepol*, kaj *Leverpole*.

Iuj opinias, ke ĝi havas rilaton kun la periodo kiam la danoj regadis en Northumbria,¹ kaj ke ĝi devenas de du vortoj danaj, *lide* aŭ *lithe*, kiuj signifas la maron; kaj *pool*, kiu signifas marbraketon; aliaj konstatas, ke ĝi rilatas al la familia nomo *Lever*; dum ankoraŭ aliaj subtenas la aserton, ke ĝi devenas de iaspeca fuko (*liverwort*) iam trovebla en la distrikto.

Tamen, la plej multe subtenata opinio estas, ke LIVER reprezentas la nomon de birdo de la markorva speco, kiu troviĝis ĉe la bordoj de la POOL. Niaj legantoj, do, libere elektu inter ili!

La rivero Mersey, ĉe kies bordoj la urbo estas lokita, estis tiele nomita ĉar ĝi formis la limon inter la regnlando de Mercia² kaj tiu de Northumbria. La iama graveco de la haveno kuŝis en tio, ke ĝi estis la enŝipigejo por Irlando!

La nomo Liverpool estis oficiale uzita por la unua fojo en dokumento

¹ Tiam regnlando en nordoriento de Anglujo.


² Tiel nomiĝis parto de la angla gento, nomita Angles, kiu, en la jaro 600 starigis regnolandon en la supra valo de la Trent.

subskribita de la reĝo Johano (tiu tempe la grafo de *Montaigne*) ĉirkaŭ la jaro 1190; kaj, en la jaro 1207 la urbo ricevis rajtskribaĵon de tiu sama reĝo. Oni povas diri, ke ĝia historio kiel burĝurbo datiĝas de tiu okazintaĵo. Dudek jaroj pli poste la urbo fariĝis oficialigita burĝurbo, laŭ dekreto de la reĝo Henriko III. Kelkaj aliaj rajtskribaĵoj estis donitaj al la urbo de diversaj reĝoj, antaŭ ol la urbrega akto, la lasta el kiuj estis donita de la reĝo Georgo IV., en la jaro 1828.

La nuna blazonŝildo de la urbego kun subtenantoj, unue uzita kiam *Charles Jenkinson* fariĝis la unua grafo de Liverpool en 1797, prezentas markorvon tenantan en la beko branĉeton de fuko. La birdo, nomita *liver* aŭ *lever*, estas, oni diras, nur kreitaĵo de la fantazio, kaj tute nekonata speco en la realeco; la branĉeton en la beko de la birdo oni nomis "*liverwort*." Tiamaniere oni celis pravigi la nomon de la urbo.

La urbo posedis kastelon kaj turon, kiuj ludis gravan rolon en ĝia historio. La kastelo, oni diras, estis konstruita de *Roger de Poitiers* ĉirkaŭ la jaro 1080. Ĝi estis granda konstruaĵo, ĉirkaŭita de fortaj pafreparitaj muroj, kun kvar rondaj turoj kun remparoj. Dum la sieĝo de la urbo en la jaro 1644, ĝi estis difektita kaj estis ekokupita de la princo *Rupert*.

La turo havas strangan kaj okazo-plenan historion, sed oni scias nur malmulton pri ĝia plej frua sorto. Dum la regado de la reĝo Henriko IV., ĝin ekposedis *Sir John Stanley*, kiu, en la jaro 1404 petis permeson "fortikigi sian domon ĉe *Leverpull*." Dum la sieĝo ĝi estis la ĉefsidejo de la parlamentanoj, kaj post la kapitulacio de la urbo, la princo *Rupert* utiligis ĝin kaj la kastelon por siaj soldatoj kaj militkaptitoj.



La Kongresejo : Halo de S-ta Georgo, Liverpool.

Liverpool estante plejparte moderna urbo (nur de post la jaro 1660 ĝi fariĝis grava) ne posedas antikvajn monumentojn nek mez-epokajn belaĵojn, sed kiel gravega komerca urbo posedas multe da modernaj interesaĵoj. Plej unika estas la haveno kaj ĝiaj dokoj, kiuj etendiĝas dek unu kilometrojn laŭ la orienta bordo de la rivero Mersey, kun plua grupo sur la okcidenta bordo. Elektra superstrata fervojo donas komunikon al la dokoj kaj samtempe provizas al la vojaĝanto interesan panoramon. En la centro de la linio sur la riverbordo estas la fama flosanta kajo (nomita elŝipirejo) —longa 800 metrojn—kie pasaĝeroj eniras aŭ eliras je la vaporŝipoj. Ĉe tiu punkto koncentriĝas la vaporŝipoj, kiuj faras komunikon al la transa bordo de la rivero, kaj sur la apuda digo la tramvojoj ekiras al ĉiuj kvartaloj de la urbo.

Trans tiu digo, sur la loko de malnova doko, tri grandegaj konstruaĵoj formas imponan pordegon al la komerca urbo. La plej granda el tiuj ĉi, la propraĵo de la mutuala societo "Liver," konstruita antaŭ dek jaroj provizas oficejojn por centoj da ŝipkompanioj kaj firmaoj. La meza konstruaĵo, propraĵo de la ŝipkompanio "Cunard" kompletigis nur en 1916, kaj enhavas luksajn oficejojn por ĉi tiu kompanio kaj aliaj. La tria, plej suda, konstruaĵo, kronita de bela centra

kupolo kaj kvar malpli grandaj, estas la oficejo de la havenestraro, kaj estas interne riĉe ornamita per marmoroj.

Sed la plej fama kaj bela konstruaĵo de Liverpool estas la "Halo de S-ta Georgo," kiun la Kongreso disponos por siaj kunvenoj. Ĝi estis konstruita por la Urbestro inter la jaroj 1838-1854 por provizi publikajn kunvenejojn kaj ankaŭ juĝejojn. La stilo estas Romano-Greka, tre perfekte ellaborita de la juna desegnisto *Elmes*, tiam nur 24-jara, kiu gajnis la premion en konkurso por desegnoj. La suda fronto kaj la orienta flanko estas ornamitaj per belaj kolonaroj, kaj la tuto prezentas impone solidan samtempe gracion desegnon. La granda ĉambro estas riĉe ornamita per granitaj kolonoj, balustradojn el marmoro kaj alabastro, mozaika pavimo, bronzaĵoj, k.c., kaj enhavas belegan orgenon. La malpli granda koncerthalo—bela kaj taŭga ĉambro—estos uzata por kelkaj kongres-kunvenoj. En la diversaj malpli grandaj ĉambroj oni trovas akceptejon kaj ĉion necesan por kongreso.

La vizitanto ankaŭ dezirus vidi la novan katedralon, kiu, kvankam nur parte konstruita estas plena de intereso kaj beleco, kaj havas promeson esti la ĉefverko de la moderna gotika arto en Britujo.

Alvoko de Holanda Samideano.

Oni ofte diras, ke tempo estas mono; tial estas necesege, ke oni ĉiujn okazojn, kiuj sin prezentas tuj akceptu kaj oni kiel eble plej rapide ekkomencu labori laŭ tiu direkto kie helpo, certe de ĉiuj flankoj de la mondo de kie ajn, tuj estas necesa por sukcesigi la aferon grandioze.

Dum la pentekosta semajno (6-10 junio), la Brita Esperanto Asocio okazigos grandegan kongreson esperantistan en *Liverpool*, la dua plej granda urbo en Britujo kaj unu el la plej grandaj havenurboj de la mondo.

Tial estas certe tre necesa kaj tre urĝa devo de ĉiuj geesperantistoj tutmondaj, ke ili subtenu la aferon tiel kiel estos eble, por ke la kongreso iĝu tiel grandioza, kiel ankoraŭ neniam aŭ malofte estas okazita kaj la homaro el la tuta mondo preparolu kaj priskribu ĝin jam longa tempo antaŭ kaj post la kongreso. Kiam mi legis la komunikon, ke okazos kongreson, mi senprokraste ekpripensis la aferon tre serioze kaj prenis la decidon tuj sendi poŝtmandaton de £2, proksimume Sm. 20—kiu nun jam estos alveninta, por subteni la movadon, ĉar laŭ mia opinio la kongreso unike devu sukcesi pro la tempo pli ol matura nun estas por nia ideo, la emociplena, animplezura, kaj pacdonanta lingvo. Mi petegas vin, ke vi tion ĉi tre serioze legu, kaj ke vi la helpon de mia flanko nur konsideru kiel ekzemplon, kiu, mi esperas, per entuziasmo je ĉiuj el vi laŭ povo estos sekvata, alie mia elspezo gajnita per laboro ne multe efikos.

Multe mi jam elspezis certe pli ol 2000 guldenojn por nia kara sankta lingvo, kaj multe mi certe ankoraŭ elspezos, kaj tial pro suprenomita mi supozas ankaŭ, ke multe nun sekvos min per helpo kiu ajn.

G. VAN HEEK, Steynstraat 72,
Hengelo (o) Holland.

CONGRESS PROGRAM.

FRIDAY.

Akceptejo opens.

SATURDAY.

11.0 a.m.—Meeting of the B.E.A. Literary and Debating Society.

2.30 p.m.—Visit to Cathedral and Museum.

3.30 p.m.—Congress photograph outside the kongres-ejo.

Evening.—Public propaganda meeting and Esperanto demonstration.

SUNDAY.

Morning.—*Esperanta Diservo.*

„ *Komuna lunĉo.*

Afternoon.—Open-air Meeting.

Evening.—All-Esperanto Concert.

MONDAY.

Morning.—B.E.A. Annual Conference.

Afternoon.—Visit to Atlantic liner.

The Canadian Pacific Ocean Services, Ltd., has kindly promised (through the courtesy of their Assistant Manager, J. A. Martin, Esq.), to receive on board and conduct the congressionists over their large twin-screw passenger steamer *Minnedosa*—gross tonnage 13,971—and also entertain them to afternoon tea, thus providing a unique experience.

Evening.—Congress Carnival and Ball.

TUESDAY.

Morning.—Visit to University, etc.

Afternoon.—Visit to Port Sunlight.

* * *

FILMING OF THE CONGRESS.—The Gaumont Film Co. will film all the outdoor events of the Congress, and intend to specially secure from Paris the film of the Antwerp International Congress of 1911, which will be shown in Liverpool during Congress Week.

“Play the Game.”

A WORD TO TINKERS.

Some time ago a correspondent in *The Spectator* asked for the Latin equivalent of the English phrase “Play the Game.” It was interesting to note that although there were more than a dozen different translations proposed, none gave a really satisfactory rendering of the sense in which the Britisher uses these words. They have, like the English word “gentleman,” a peculiar meaning of their own for which no language, ancient or modern, including Esperanto, is adequate.

“Play the Game” is a phrase which makes a splendid appeal to one’s manhood. It is one of those pithy sayings which have been carried from the sports field into the stress of life. It implies contempt for all that is unsocial, or dirty, or mean, or low. There are rules of conduct, unwritten as well as written, as there are of cricket and football, and so long as we are in the game the only decent thing to do is to act up to them, not only in the letter, but in the spirit. We have no use for any player who comes into the game determined to play it in his own way and break the rules. In ordinary life we call such a man a cad, in social and political life he is called an anarchist.

In Esperanto, as well as in cricket, we have rules. These are expressed in the *Fundamento* and in the *Universala Vortaro*. They form, as it were, the common code by which we communicate in speech and in writing with our fellow Esperantists throughout the world. They are the constitution of that League of Nations to which we belong, which no majority, and certainly no individual, has a right to alter in any particular. This is the rock on which Esperanto is built. If it were otherwise, our Esperanto would be a house built upon the sand.

Our builder has built wisely, so wisely that to interfere with the language here or there is a menace to the whole structure. From time to time schemes of reform appear. Some of them are the work of the same author, who evidently, being blessed (?) with more money than common sense, publishes project after project, with *Ekzercaro* complete, with amazing fertility, after his old ones have been riddled with criticism. Everybody who has learned Esperanto thinks at some time or other that he could improve some detail of it. It would likely be found that what would make the language easier for an Englishman would make it more difficult for, say, a Russian, and then one begins to realise the wonderful genius of the author in mediating between the different language instincts of the different peoples.

Esperanto was given to the world for the use of the plain man, the common people. The scholar and the pedant may find ground for criticism of this or that detail, but it appears to us that a language which can be taught successfully to young children, so that they can read, write, and speak it fluently in the course of a single school session, and which has been capable of translating the whole Bible from Genesis to Revelation, can be safely accepted as a safe and adequate basis for the expression of most human needs. What value, then, has mere criticism of detail? Practice has generally shown that what seemed to be a disadvantage in the language is really an advantage. What may seem to one to be a fault may be to another a merit. But the curious thing is, that beyond the detail to which his criticism is directed, the critic declares that Esperanto is perfect.

We therefore decline to entertain

any scheme for changing Esperanto in its spelling, grammar, or vocabulary. As practical people we accept the language as we received it from Dr Zamenhof, and we are prepared to "play the game." In this attitude we feel and know that we have the support of the vast majority of Esperantists all over the world. Whoever does anything else is hindering the advance of the International Language movement.

The progress of Esperanto grows in momentum daily. It has reached the stage when its force is irresistible. We shall soon be reaping the full harvest of thirty years' sowing, and the full mēed of recognition which we seek will come all the sooner the more united we are in the common endeavour. If Esperanto fails to win that recognition, it will not be because of the accented letters, or some detail which does not appeal to some individual here or there, but because of those *soi disant* "diciploj" of Zamenhof who do not "play the game."

W. M. PAGE.

* * *

Lulkanto.

Dormu karega infan'.
Via patrino la man'
Lulas vin ame kaj ŝi
Kantas lulkanton por vi.
Dolĉa kaj paca trankvil'.
Regu sur via lulil'.

Kaj post benata ripoz'
Freŝa vekigu la roz'.
Vekigu la roz'.

Ĉio jam dormas ja nun,
Sub la ĉielo kaj lun'.
Floroj kaj tuta birdar'
Kune nun en la kampar'.
Songas en dolĉharmonii'.
Fermu okulojn do vi!
Kaj en lulilo vi jen
Dormu ĝis morgaŭ maten'.
Morgaŭ maten'.

Originalo de J. D. APPLEBAUM. Kanteblo laŭ melodio de Mozart.

Progresado de japana industrio.¹

Dum 1918 la komerco de Japanujo denove montris gravan pligrandiĝon. La importoj, kiuj estas gravaj, konsistis tamen speciale el krudaj materialoj aŭ duon-fabrikataj artikloj. La eksporto de fabrikaĵoj pligrandiĝis kaj prezoj multe ŝanceladis, sed tiu de krudaj materialoj kaj manĝaĵoj ne montras gajnon aŭ ŝanceladon.

La ĉefaj eksportaĵoj en la manĝaĵa fako estis; rizo, faboj, maraj produktaĵoj, agaragar, teo, rafinita sukero, biero, prezervitaj manĝaĵoj, kaj en la fako de krudaĵoj: karbo, traboj kaj silkaj elĵetaĵoj.

Dum la lasta jaro la eksportoj de rizo kaj sukero estis: yen 8,076,000 kaj yen 22,800,000 respektive, sed en 1917 ili estis yen 14,321,000 kaj 25,168,000.

La eksporto de ĉiuj aliaj komercaĵoj kontraŭe, pligrandiĝis. Speciale silkaj elĵetaĵoj: yen 26,278,000 kontraŭ yen 15,526,000 dum 1917-a jaro.

Tamen tiaj gajnoj ne estas gravaj kompare kun tiuj en la fabrikaĵa fako. En la grupo de duon-fabrikataj komercaĵoj oni notis malgajnon en la sekvantaj: fiŝa oleo, sulfuro, kamforo, kupro, plektaĵoj k.t.p. sed en ĉiuj aliaj artikloj la eksportoj pligrandiĝis, kompare kun la antaŭa jaro. Kotonaj fadenoj montras yen 152,387,000 kontraŭ yen 104,894,000 en 1917, do gajnon de yen 47,493,000. Kruda silko: yen 356,712,000 kompare kun yen 341,505,000 (gajno yen 15,207,000).

Esceptante ledajn artiklojn kaj tablokovrilojn oni povas noti ĝeneralan gajnon en la eksportoj de fabrikaĵoj. Plej gravan gajnon montras katunaĵoj (yen 104,834,000) de kiuj, kompare kun 1917a jaro: yen 123,016,000, oni eksportis por yen 227,850,000. Habutai (neblankigita silka ŝtofo) montras gajnon

¹ Article in Esperanto from "The World Salesman," a commercial monthly review, published in Japan, which has a regular Esperanto section.

de yen 22,711,000. Ankaŭ fajencaĵoj kaj porcelano gajnis yen 5,376,000.

La ĉefa kaŭzo de la pligrandigita eksporto de katunaĵoj estas la gravaj aĉetoj el Brita Hindujo. Krom tio ankaŭ pligrandiĝis la demandado el Franca Indo-Hindujo, Holanda Orienta Hindujo, Siano kaj Aŭstralio. Kotonaj fadenoj estis aĉetataj pli grandkvante speciale de Filipinaj Insuloj, Hong-kong kaj Brita Hindujo.

Koncernante krudan silkon oni devas rimarki ke la pligrandigo trafas nur la valoron, sed ne la kvanton, kiu malplialtiĝis. La eksporto de alumetoj montras gajnon de yen 3,119,000 sed ankaŭ tie la ĉefa kaŭzo estas la plialtigo de la prezoj.

Fajenco estis demandata el Brita Hindujo, Aŭstralio, Holanda Orienta Hindujo kaj ĉirkaŭantaj partoj.

La importoj de krudaj materialoj estis gravaj kaj plialtiĝis de unu monato al l'alia. Nur amonia sulfato alvenis pli malmulte, ĉar oni produktis ĝin en pli grandaj kvantoj ol antaŭe en la lando mem. Kruda kotono estis importita por yen 187,000,000 pli ol en 1917, kaj lano, yen 7,382,000 pli.

En metala eksporto la ĉefaj plialtiĝoj estis:

Ŝtalaj fandaĵoj, vergoj, folioj kaj tavoloj je yen 38,383,000 (importo yen 198,868,000). Feraj fandaĵoj kaj platoj montris pligrandiĝon de yen 45,351,000 (importo yen 69,237,000). Ankaŭ feraj tuboj montris gajnon de yen 5,371,000 (importo yen 13,640,000).

Generale oni povas diri ke Japanujo importas krudajn kaj duonfabrikatajn komercaĵojn kaj eksportas manĝaĵojn kaj fabrikaĵojn. Sed dum la jaroj de la milito la demando por luksaĵoj pligrandiĝis treege. Aŭtomobiloj estis importataj en grandaj nombroj. Vestaj ŝtofoj, juveloj, parfumoj, k.t.p., estas multe postulataj. Japanujo estas do grava komercplaco por multaj fabrikaĵoj el eksterlando.

Koncernante la kvaliton de eksportitaj el Japanujo fabrikaĵoj, pri kiuj multaj plendoj estis aŭdataj, oni devas diri, ke dum lasta tempo la Registaro multe faris por plibonigi la kvaliton de produktaĵoj kaj decidis inspekti preskaŭ ĉiujn eksportotajn el Japanujo fabrikaĵojn. Tiu metodo jam donis bonajn rezultojn kaj la registaraj laboratorioj, kiuj garantias la kvaliton de drogoj kaj ĥemiaĵoj ankaŭ multe helpis en tiu fako.

Certe la japanaj fabrikistoj ne ĉiam havas la necesan sperton por produkti tute nekritikeblan artiklon sed seriozaj firmoj estas tute fidindaj. Malfeliĉe ekzistas ankoraŭ tipo de "duonhonestaj" komercistoj, kies ĉefa zorgo estas pliriĉiĝi kiel eble plej rapide pere de ĉiuj metodoj, sed la vivo mem kaj la konkurenco pli kaj pli malaperigas tiun dumilitan malsanan kreskaĵon.

R. H. D.

* * *

Universala Esperanto-Asocio.

The headquarters of the Universala Esperanto-Asocio have now been removed from Geneva to 14 Museumstrasse, Bern. S-ro Hector Hodler has been appointed President in room of the late S-ro H. Bolingbroke Mudie, and S-ro Eduard Stettler succeeds S-ro Hodler as Director.

* * *

A Crowning Mercy!

A visitor to Lincoln Jail, in which Mr Fenner Brockway, former editor of "The Labour Leader," was imprisoned as a conscientious objector, writes: "For eight months he has been kept in the strictest solitary confinement, only being allowed out of his cell for forty minutes each day, when he is given exercise alone in a small enclosed yard. He is not allowed any library books, nor is he allowed to have any book of his own except an Esperanto New Testament."

N.B.—Scota Kongreso ĉe Glasgow, June 28.

Komercaj Leteroj.

Sekvo de LA INTERNACIA EKSPERIMENTO.

ESTIMATA SINJORO,—La specimeno de Ĉeviota Mallonga Kombita Lano ekspedita al vi la 26an lastan, prezentas kvanton de 2430 funtoj anglaj, kaj ni kun plezuro proponas la prezon de du ŝilingoj kaj sespencoj por funto; kosto, asekuro, kaj transporto ĉe Jokohamo, senrebate; pago je alveno kontraŭ ŝipdokumentoj.

Esperante recevi vian mendon.—Ni restas, Tre sincere la via,

* * *

Ni petas vin noti, ke ni tratis kontraŭ vi, hodiaŭ, la ĉekojn nomitajn pli sube. Bonvolu pagi ilin ĉe prezento, kaj por reenspeziĝo, vi tratu kontraŭ La Komerca Banko, Londono, je vido, citante en via trato la frazon "Tratita kontraŭ ĉeko No . . . datumita . . ."

No de ĉeko | Pagebla al | Sumo.

* * *

Al S-ro E. Martin, Ŝipmakleristo.

Mi bezonas ŝipojn por transport 10,000/15,000 tunojn da karbo de Cardiff al La Rochelle.

Se vi havas ŝipon liberan por tia vojaĝo, bonvolu sendi al mi informojn pri ĝiaj nomo, tunajo kaj klaso, kaj pri la dato, en kiu ĝi povus ŝarĝi.

Rilate la fretprezon, mi pensas, ke la fretanto pagos ĉirkaŭe 15 frankojn potune por vaporŝipo, kaj 18 fr. por velŝipo.

La enŝipigo estos farata en 3 labortagoj por velŝipo da 100 ĝis 500 tunoj, kaj elŝipigo en 5 labortagoj maksimume.

Por vaporŝipo sufiĉos 24 horoj por 500 tunoj, tiel por ŝarĝi, kiel por malŝarĝi.

La aliaj kondiĉoj estos tiuj de la ordinara ĉarto por tiaj veturoj.—Sinceran saluton,

A. WILLIAMS KAJ K-10.

SIR,—The sample of Crossbred Noils forwarded to you on the 26th ult. represents a Lot of 2430 lbs., and we have the pleasure to quote you at 2s. 6d. per lb. c.i.f. Yokohama, net cash upon arrival against shipping documents.

Trusting to be favoured with your order for same.—We are, Yours sincerely,

* * *

We beg to advise having drawn upon you to-day the undermentioned cheques, which please honour on presentation, reimbursing yourselves by drawing at sight on The Commercial Bank, London, quoting in your draft the clause "Drawn against Cheque No . . . dated . . ."

Number of cheque | In favour of | Amount.

* * *

To Mr E. Martin, Shipbroker.

I need ships to transport 10,000/15,000 tons of coal from Cardiff to La Rochelle.

If you have a ship free for such a voyage, please send me particulars of its name, tonnage, and class, and of the date when it could be loaded.

Regarding the freight, I think that the freighter will pay about 15 francs per ton for a steamship, and 18 frs. for a sailing ship.

The loading will be made in 3 working days for a sailing ship of 100 to 500 tons, and unloading in 5 working days at the most.

For a steamship 24 hours will be sufficient for 500 tons, whether to load or to unload.

The other conditions will be those of the ordinary charter for such voyages.—Hearty greetings,

A. WILLIAMS & Co.

TIRLEMONT, BELGUJO.

KARA SINJORO,—Mi deziras informi vin, ke mi estos feliĉa, se vi permesos, ke mi estu via agento en ĉi tiu lando. Se interkonsento pri tio estas ebla, bonvole sendu al mi vian katalogon kun viaj kondiĉoj.

Honesteco kaj solvebleco estas garantiitaj.

Se konstanta provizo estas necesa, mi havas tre taŭgan tenejon, kiu enhavas ĉirkaŭ tri cent dekkvin jardojn da bretaro.

Esperante, ke vi favoros min per respondo.—Mi restas, via fidele,

* * *

KRISTIANIA, NORVEGUJO.

KARAJ SINJOROJ,—Per ĉi tiu letero ni demandas, ĉu via firmo estas reprezentata en Suda Rusio. Ni proponas starigi filion en unu el la Rusaj havenurboj de la Nigra Maro, kaj difini subagentojn en ĉiuj la plej grandaj urboj de tiu distrikto. Ni estos feliĉaj fariĝi reprezentantoj de via estimata firmo kaj ricevi informon pri la kondiĉoj de la reprezentado.

Atendante vian fruan novaĵon.—Ni restas, karaj sinjoroj, Fidele viaj,

* * *

Casa editorial Juan Carlos,
San Juan, Puerto Riko.

Estimata Sinjoro,—Antaŭ nelonge mi skribis al vi sciigante la ĉe mi formatojn de pergama papero plej proksimajn je la formatoj, kiujn vi mendis, kaj la kvanton da superfluaĵo, kiun vi devus ĵeti. Volu komuniki al mi per la revenonta poŝto pri tio, ĉar mi havas ŝancon elvendi la tutan provizon por justa prezo. Se vi povas atendi du-tri semajnojn, mi povos fariĝi la ĝustan formaton ĉe la fabrikejo, kaj en tiu okazo ne estus malŝparo. Mi petas tujan respondon.—Kun altestimo,

J. N. MILLER, *Adm.*,
P. J. MILLER K-10.

TIRLEMONT, BELGIUM.

DEAR SIR,—I beg to inform you that I should be happy to act as your agent in this country. If it were possible to agree on the matter, be so kind as to forward me your catalogue with terms.

Honesty and solvability are warranted.

If a permanent stock is necessary, my premises are well suited for the purpose, having about three hundred and fifteen yards of shelves.

Trusting that you will oblige me with an answer.—I remain, Yours faithfully,

* * *

CHRISTIANA, NORWAY.

DEAR SIR,—We hereby beg to enquire whether your firm is represented in South Russia. We are planning to open a branch in one of the Russian Black Sea ports, and to appoint sub-agents in all the largest towns of that district. We should be pleased to be favoured with the representation of your esteemed firm and to receive information as to the conditions of the representation.

Awaiting your early news.—We remain, dear sirs, yours faithfully,

* * *

Casa editorial Juan Carlos,
San Juan, Porto Rico.

Dear Sir,—Some few days ago I wrote you a letter stating the nearest sizes I had to your order for Parchment paper, and the amount of waste you would have to stand. Please let me hear from you by return mail in regard to this, as I have a chance to dispose of the entire stock at a fair price. If you can wait two or three weeks I can have the same made at the mill and then there would be no waste. Kindly reply at once.—Yours very truly,

J. N. MILLER, *Mgr.*
P. J. MILLER Co.

Ekzemploj de Aplikado de la Universala Vortaro

DE H. M. SCOTT.

“La jenaj Ekzemploj estas eltiritaj el ‘Praktika Konkordanco de Klasika Esperanto,’ kiu ampleksas ĉiujn verkojn de Zamenhof, de Kabe kaj la plej bonajn aliajn aŭtorojn de Esperanto.”

BIRD-

Kolombo estas *birdo*.—*Ekz.* § 5.
Birdido—nematura birdo.—*Ib.* § 36.
Anfisuŝka . . . administris . . . la
hejmajn birdojn kaj estis samtempe
lavistino.—*P.F.* 96.
Ŝi . . . zorgis pri la kortaj birdoj.—
Ib. 4-5.
Ili trovis *gravan birdon*!—*Rev.* 97.
Bela birdo! Dando el reĝa hundejo.
—*P.E.* 579.
Al mi, *birdeto* mia, he!—*F.K.* 437.
He, vi, miaj *birdetoj*!—*Rev.* 81. (Ek-
krio al ĉevaloj.)

BISKVIT-

Mi alŝovadis al vi kuketojn, aŭ *bis-
kvitojn*.—*Rab.* 101.
Oni bakis panon kaj *biskvitojn* por la
armeo.—*Far.* i. 165.
Ĉu sufiĉos la provizo de *panbiskvitoj*.
—*Ib.* i. 11.

BISMUT-

Bismuto (estas) ĥemia elemento, grize
blanka metalo.—*Vort.*

BITUM-

La brikoj fariĝis por ili ŝtonoj, kaj la
bitumo fariĝis por ili kalko.—*Gen.*
xi. 3.
En la valo Sidom estis multe da
bitumaj kavoj.—*Ib.* xiv. 10.

BIVAK-

Nenio estas tiel bela, kiel nokto en
bivako.—*Km.* 38.
En la griza matenkrepusko, li estas
vekata el sia *bivako*.—*Boi.*—*L.R.*
iii. 406.
Mi avertis vin, mia kara vizitanto . . .
ke ni vivas ĉi tie, kvazaŭ en *bivako*.
P.F. 92.

BLANK-

Papero estas *blanka*.—*Ekz.* § 10.
Czernicka elkondukis la ŝtonigintan
kaj *blankan* kiel tolo Helkan.—
B.S. 32. (*Kp.* pala, kiel tolo.—
F.K. 121. *Paliĝis* kiel vakso.—*Far.*
iii. 6.)
La Negro . . . frotis siajn okulojn,
kies *blanko* brilis.—*Far.* i. 70.
Organika substanco, kiu formas la
blankon de ovo.—*Vort.* p. 6.
Ovoblanko bone batita.—*F.K.* 180.
Ĉambreton kun deŝiritaj tapetoj kaj
kun ne *blankigitaj* fornoj.—*F.K.*
132. (*Kp.* muroj . . . *kalkitaj*.
—*Mar.* iii. 487.)

BLASFEM-

Ĉu ili ne *blasfemas* la honorindan
nomon?—*Jak.* ii. 7.
La *blasfemo* kontraŭ la Spirito ne
estos formetita.—*Mat.* xii. 31.
Ni aŭdis lin parolantan *blasfemajn*
vortojn.—*Ag.* vi. 11.
Kunsido de *blasfemantoj*.—*Ps.* i. 1.
Senhonta *blasfemisto*!—*Rab.* 33 (en
afero ne religia).

BLAT-

Blato (estas) hejma insekto tre mal-
utila.—*K.* kaj *B.*

BLAZON-

Mi ja estas plebejo, mi ne havas
blazonon.—*P.F.* 98.
Ĉi tiu domo havis frontonon kun
blazono.—*Ib.* 64.
Ĉie vidiĝas la malnova *blazono* de
Munĥeno.—*Esp.* x. 301.
Junulo, vestita per griza livrea jako
kun blankaj *blazon-butonoj*.—*P.F.*
12.
La domoj de la foirejo estis garnitaj
per *blazonŝildoj*.—*Baĥ.* 292.

La Tria Australia Kongreso Esperantista, Septembro 1919.

Ni sendas nian koran samideanan saluton al la tria Aŭstralia kongreso Esperantista kiu okazos en Sidnejo en Septembro.

La organizantoj deziras, ke ĉiuj Esperantistoj sendu gazetojn, kaj interesajn objektojn por montri la disvastiĝon de nia lingvo al la antipoduloj. Skribu al S-ro. Leslie E. Pfahl, Sekretario, "Edna," Clissold Parade, Campsie, Sydney, N.S. Wales, Australia.

* * *

If only . . .

Writing in "U.D.C." on "The Berne Conference," Mr Charles Roden Buxton, who acted throughout as British interpreter, says:

"The chief mechanical obstacle to the common work of the peoples lies in the language question. . . . If all the delegates could have spoken Esperanto, not only would they all have understood one another, but (a point not sufficiently realised) *three times as much business could have been done in the time.* All the intelligence of Europe was once united by the common use of Latin. We have got to bring similar conditions back again. "Esperanto," said Jaurès, "is the Latin of Democracy. *Esperanto prezentas al la civilizita mondo la veran solvon de la lingva problemo.*"

* * *

The *Daily Express* Correspondent at the Peace Conference in Paris wrote concerning the Peace Treaty:—

"There is no official Italian version, and the English and French versions make two separate volumes. In many instances the translation, both from English to French and from French to English, is *clumsy*, and in some instances *inexact*, and *there is the possibility of trouble in the future* unless established precedent is followed and the French text is regarded as authoritative."

Why did they not write it in Esperanto?

Tragedio.

La fino estis veninta. Ŝi ne lin amis. Ŝi estis rifuzinta lian amon.

Li eliris sur la straton, deziregante simpation sed ĝin ne trovante. Ĉia ĝoja renkonto, ĉia amika okazaĵo, doloron aldonis al li, kaj grandigis lian senesperon. Maldolĉe li demandis al si ĉu vivado estas vivinda? La respondo estis, ne.

Restis ĉiam fina rimedo. Rapide li eltiris el sia poŝo nigran kaj ruŝan objekton, kiu havas rondan kaj brilan barelon.

Li ĝin ŝargis intence kaj ĝin levis al siaj—lipoj! Baldaŭ liaj mizeroj trankviliĝis dum la cirkletoj de tabakfumo supren kirlis.

H. C. DAVIS.

* * *

Mastrino: — Ĉu vi havis vizitanton hieraŭ vespere, Mario?

**Mario*: — Jes, Sinjoro, ĝi estis mia onklino.

Mastrino: — Ja! kiam ŝi denove venos, diru al ŝi, ke estas malpermesate, lasi la pipon kaj tabakujon sur la fortepiano.

* * *

Policano (al perdita infano): — Kia estas via nomo?

Perditeto (plorante): — Mi . . . ne . . . ne . . . e . . . sc . . . c-ias.

Pol.: — Kie vi loĝas?

Perd.: — Mi . . . ne . . . ne . . . e . . . sc . . . scias.

Pol. (lerte): — Kie vi aĉetas la sukeraĵojn?

Perd. (ekridetante): — Ĉe la butiko de Sinjorino Marŝalo. Infano rehejmigita kompreneble!

* * *

Antaŭ du jaroj, du knabetoj, unu sepjara, la alia okjara, aŭskultis la gepatrojn, priparolantaj pri skeletoj. La plijuna knabeto aŭskultis atente, kiam la alia subite ekkris:

— Vi ne scias tion, kio estas skeleto, sed mi scias.

— Ankaŭmi,—respondis la sepjara,—mi ja scias.

— Nu, kio ĝi estas?

— Ĝi estas ostoj sen la persono.



Competition for Boys and Girls

Conducted by Miss JANE BAIRD.

This Competition is limited to boys and girls of not more than 15 years of age. Competitors must write their solutions on a postcard addressed "KONKURSO," c/o Miss JANE BAIRD, 95 Bellevue Road, Edinburgh, and add their age and the name of their school. A Monthly Prize will be given, and at the end of the Competition special prizes will be awarded to those who obtain the highest total number of marks.

N.B.—It must be understood that Solutions are the competitors' unaided work.

In schools where Esperanto is taught it is suggested that the teacher collect the cards and send them in under an envelope, to save postage.

FIFTH COMPETITION.

Postcards to be sent not later than 4th June.*

(a) Nomoj de Knabinoj.

Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de knabinoj kaŝitajn en la jenaj frazoj:—

1. Ĉu vi ne sentis vin iomete laca post la vagado?
2. Mia servanto Tomaso fidele servadis min dudek jarojn.
3. Kuru tre rapide, ĉar la afero estas urĝa.
4. Kiu elektis tiun belan nomon por via pupo?
5. Malgranda poŝtranĉilo estas tre utila donaco por knabo.

(b) Floroj.

Eltrovu la nomojn (nur radikojn) de floroj kaŝitajn en la jenaj frazoj:—

1. Li rakontis ĝin, kvazaŭ ĝi estas travivaĵo lia.
2. Tiuj knaboj estas pli altkreskaj ol iliaj fratinoj.
3. Volonte mi gastigos vin kaj ankaŭ vian amikon.
4. Ĉe la internacia balo ni certe portos nacian kostumon.
5. La ĝarden-bedoj estis hele borderitaj per floroj ĉiukoloraj.

Result of the Third Competition.

The highest number of marks in this competition has been gained by:

FREDERICK EVANS (age 12),
Green Lane C.C. School,
Patricroft.

Honours List (11 marks).—Katharine Langley, *Buxton C.C. School*; George Clayton, *Eccles*; David Anderson, David Blair, Robert Brandie, Matthew Browning, William Burchell, Kenneth Christie, Thomas Cuthbert, James Finlay, Meg Fleming, George Francis, James Hare, Robert Jamieson, W. S. Kinghorn, Bella Leiper, Bessie M'Donald, Charles M'Intosh, Robert Murison, Alexander Reid, Walter Shand, Robert Stewart, Richard Wimberley, *Donaldson's Hospital, Edinburgh*; James Ramsay, Robert Thomson, John Williamson, *Bonnington Road School, Leith*; Dorothea Darbon, *Highbury Hill High School, London*; Connie Darbon, Katharine Osmond, *North London Collegiate School*; Ernest Beardshaw, Nora Bradburn, George H. Crawshaw, Marjorie Dyson, James Floyd, Frank Harley, Ella Holden, Ernest Holt, Doris M'Clelland, Wilfred Marley, Godfrey Nelson, Dorothy Norris, Wm. Parker, Walter Smith, John Stanbrook, Samuel Wilkins, Kenneth Wilson, *Green Lane C.C. School, Patricroft*; Muriel Severn, *St John's College, Worcester*.

Hon. Mention (10 marks).—Florence Barratt, Arthur Dean, Norman Finlow, John Fletcher, John Holland, Thos. Kennedy, Wm. Kershaw, Fred Miles, Mark Weston, *Green Lane C.C. School, Patricroft*; H. P. Mulholland, *Bishop's School, Salisbury*.

Commended (9 marks and under).—James Ashurst, Joseph Batten, Sidney Brown, Harold Burns, Herbert Daniels, Smith Dugmore, G. Dupree, G. Hadcroft, Archie Hooley, James Holland, Ernest Humphries, Thos. Hunter, John Jones, Daisy Owen, Frank Pearson, Charles Roberts, George Smith, H. S. Wilson, *Green Lane C.C. School, Patricroft*.

SOLUTIONS.

(Third Competition, p. 32.)

(a) Vegetaĵoj:—(1) salvi, (2) kapor, (3) brasik, (4) bet, (5) tomat.

(b) — aĝo:—(1) bandaĝo, (2) vojaĝo, (3) domaĝo, (4) kuraĝo, (5) masaĝo, (6) vilaĝo.

* * *

Pitman's Journal announces a course of Commercial Esperanto to run in its columns for several weeks. The author is Mr A. W. LYNDRIDGE, of Southend-on-Sea, author of "Esperanto Shorthand," an adaptation of Pitman's Shorthand to Esperanto.

Lancashire and Cheshire Federation.

The 44th Quarterly Conference and 4th Konkursofesto took place at Onward Buildings, Manchester, on Saturday, 5th April. Sir Daniel M'Cabe (Ex-Lord Mayor) welcomed the delegates, and expressed satisfaction at seeing so many children enthusiastic about Esperanto. Mr Sanderson (Headmaster of Green Lane Council School) confirmed his previous statements in regard to the effect created upon the children in other branches of knowledge by the study of the language, and urged its adoption in the curriculum of all schools.

In all, 66 competitors entered the various competitions, and 135 written works were submitted. In the oral tests 86 entries were received, including five choirs with six children in each.

Undoubtedly the most convincing items rendered during the afternoon were translation tests from Esperanto to English and *vice versa*, and accounts in Esperanto of holiday experiences. The children vied with each other for first place, and some were very ingenious in their choice of words and in the interpretation of phrases. In several competitions the prize winners were children of nine and ten years.

At the close of the proceedings Mrs Rhodes Marriott distributed the certificates and prizes.

The highest number of marks was secured by Harry Rogers (Manchester), who will receive expenses to the Congress; the second place fell to James Holland, who received

a silver medal; and the winning choir was presented with a shield.

The prize-winners were:—

Original Fairy Tale.—Catherine Langley (Buxton); Edith Massey (Warrington); John Holland (Green Lane School).

Correspondence.—Albert King (Green Lane School).

Dialogue.—James Holland, Fred Miles (Green Lane School).

Essay.—"The Utility of Esperanto"—Magdalene Fisher (10), (Manchester).

Esperanto Translation.—Fred Miles (Green Lane School); Rita Applebaum (9), (Liverpool). Specially commended.

English Translation.—Harry Rogers (Manchester).

Recitation.—Florence Barrett (Manchester).

Holiday Experiences.—Fred Miles (Green Lane School).

Oral Translations.—Rita Applebaum, Fred Miles.

Solo.—Ella Holden (Green Lane School).

* * *

Schoolboy Esperantist desires to get into touch with Warwickshire "samsortanoj." View: League. G. Crowther, 36 Monkbridge Road, Headingley, Leeds.

C.O.'S AND ESPERANTO.—Some 110 C.O.'s who have learned Esperanto in Wandsworth prison have decided to translate and publish, in memory of this, some work of English Literature, probably *News From Nowhere*. They are anxious to get into touch with C.O.'s from other prisons, and hope that those who are free will let others know. Promises of assistance and all enquiries should be sent to H. H. Miles, 59 Perry Hill, Catford, London, S.E. [ADVT.]

U E A

Universala Esperanto Asocio

Every Esperantist should become a member of the U.E.A. and subscribe to its official organ "ESPERANTO."

The Annual Subscription to the Association is 2s., and to the Gazette 5s.

Delegates of the U.E.A. throughout the world

Central Office

14 MUSEUMSTRASSE, BERNE, SVISUJO

DUTTON'S 24 HOUR

DUTTON'S Shorthand has only six rules and twenty-nine characters. Complete theory learned in twenty-four hours. That stage reached, practice quickly gives high reporting speeds. Send two stamps for specimen lesson to Dutton's College (Desk D. 62), Skegness.

SHORTHAND

THE ESPERANTO MONTHLY

Subscription—2/6 per annum, post free

SUBSCRIPTIONS and all BUSINESS COMMUNICATIONS should be addressed to *The British Esperanto Association*, 17 Hart Street, London, W.C.1

EDITORIAL MATTER should be sent to S-ro W. M. PAGE, 218 Bruntsfield Place, Edinburgh.

SELECT LIST OF ESPERANTO BOOKS

OBTAINABLE FROM
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (Incorporated)
 17 HART STREET, LONDON, W.C.1

IMPORTANT INTIMATION AS TO BOOK PRICES.

In accordance with the instruction of the Annual General Meeting of the Association on 20th May 1918, the Executive has made the following decisions:—

Members' Discount to be abolished.

The prices of books published abroad to be adjusted to meet the present great increase in cost of importation.

Members' Orders value 10s. or over post free. In all other cases at least 10 per cent. (one-tenth) should be added for postage.

Secretaries of Affiliated Groups and the Trade to receive the usual discounts and to pay carriage.

The present 10 per cent. War increase on list prices to be abolished.

THE ESPERANTO MANUAL

By MARGARET L. JONES

Fifth Edition. 1s. 6d. net, 1s. 8d. post free

THE ESPERANTO TEACHER

By HELEN FRYER

Sixth Edition. 1s. net, 1s. 2d. post free

Second Edition **THE** *Revised*

'EDINBURGH' ESPERANTO POCKET DICTIONARY

206 pages. 18,000 words

"A really useful, convenient, and presentable volume."—*British Esperantist*.

Leather, 2s. 7d. post free; Cloth, 1s. 7d. post free

SHAKESPEARE IN ESPERANTO

HAMLET (Dr ZAMENHOF). Paper, 2s.

MAKBETO (LAMBERT). Cloth, 2s.

LA VENTEGO (MOTTEAU). Cloth,
2s. 2d.

LA VENECIA KOMERCISTO
(WACKRILL). Paper, 1s. 6d.

THE BIBLE IN ESPERANTO

NEW TESTAMENT, complete

(Published by British & Foreign Bible Society)

White Paper, Art Cloth, 2s.; French

Morocco, 2s. 6d.; Persian Yapp, 5s.

India Paper, French Morocco, 3s. 6d.;

Persian Yapp, 6s. 6d.; postage 3d. extra

OLD TESTAMENT

Dr ZAMENHOF's Translations

Genesis, Exodus, Leviticus, Numbers,
Deuteronomy, 2s. each; the Psalms,
2s. 6d.; Proverbs, 1s. 6d.; Ecclesiastes, 9d.

By BERNARD LONG, B.A.

ESPERANTO AND WHY WE NEED IT

30 pp. Price 2d.

Two Shillings a dozen post free

"A convincing booklet"

INDISPENSABLE BOOKS

FOR ADVANCED STUDENTS

GRAMMAR AND COMMENTARY

Compiled by

Maj.-Gen. GEORGE COX, B.A. (Cantab.)

Post free, 2s. 9d.

ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY

By EDWARD A. MILLIDGE

Post free, 5s. 3d.

ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY

By JOSEPH RHODES, F.J.I.

Post free, 5s. 5d.